

Esperanto en servo de la monda paco



PAKO

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)



S. N.
Podkaminer

2
81

post la porpaca parlamento de la popoloj

En n-ro 1 de „Paco“ ni publikigis ties bazajn dokumentojn. Ili prezentas programon por agado de ĉiuj pacamaj fortoj, de ĉiuj eroj de la tutca monda pacmovado. La kvinmembra delegitaro de MEM aktive partopreninta en pluraj sekcioj de la Parlamento, starigis multajn utilajn kontaktojn, kiuj altigas la aŭtoritaton de MEM. Tio montris ankaŭ la MEM-kunveno en Sofio, kiun partoprenis la sekretario de Monda Pakkonsilio. Nun kun ĉiuj pacagantoj ni devas mobilizi niajn fortojn por plenumo de la decidoj de la Sofia forumo.

Ni ne plenumus nian pacbatalan devon, se ni starus flanke de la ĝenerala movado, se ni sektece agus en nia fermita rondo. Kune kun ĉiuj progresemaj movadoj ni devas kontraŭstari la imperiistajn planojn, fortikigi la pacon.

Plej proksimaj al ni estas la diverstendencaj esperantistaj organizaĵoj. Multaj el niaj aktivuloj partoprenas en ili. Nia ĉiutaga tasko estu diskonigo de la decidoj de la Monda Porpaca Parlamento de la Popoloj, ilia konkretigo en la aktuala internacia situacio kaj dedukto de niaj taskoj. La imperiismo ne damaĝas rimedojn por kalumniado al la socialismaj ŝtatoj, la plej konsekvencaj strebantoj al konservo kaj stabiligo de la paco en la mondo. Ni devas levi nian torĉon kaj per ĝia lumo senmaskigi la mensogojn al la pacbatalantoj.

La naturo mem de la imperiismo bezonas konstantan tension, fabrikadon de amasmortigiloj, instigadon de militoj. Ni ne povas ŝanĝi tiun naturon. Gis kiam sur la tero ekzistos imperiismo, ŝvebos super la turmentita homaro nigraj nuboj de militdanĝero, de totala neniigo. La celo estas neniigi ĝin. Sed la realo montras, ke ĝi posedas grandajn fortojn kaj la batalo estos daŭra. Pro tio la pacamaj fortoj starigas pli konkretan kaj realan taskon: bridi la militincendiajn strebojn de la imperiismo, bari la vojon de iliaj demonaj planoj.

Esperanto estas kroma tre efika forto, kiun ni devas utiligi kaj montri al la mondo. Nur tiumaniere, utiligante la internacian lingvon por praktikaj kaj sociaj celoj, por la progreso de la homaro kaj precipe en la batalo por paco, ni montros al la homoj ĝian utilon kaj neceson. Ĉiu esperantisto havas plurajn korespondantojn en diversaj partoj de la mondo, kun kiuj li povas konversacii pri la mondproblemoj, pri la paco kaj la milito kaj disvastigi la veron, senmaskigi la mensogon, la trompon, la ĉiutagan rompon de la rajtoj de la popoloj je sendependeco, libero, normala kontentigo de la bazaj bezonoj.

La klariga kaj agita laboro devas plenumiĝi

paralele kun organizaj kaj amasaj aranĝoj. Ni devas konvinki la lokajn Esperanto-societojn, ke se oni estas veraj adeptoj de Zamenhof, oni devas labori por konservo de la paco, por interfratigo, por amikeco inter la popoloj. Kaj por tio oni ne devas nur paroli, sed agi. Oni devas voĉdonigi rezoluciojn, aranĝi ekspoziciojn montrantajn la volon de la popoloj por paca kunvivado, demonstraĵoj kontraŭ la insidajn planojn de la militamantoj kaj komercistoj de la morto.

La Monda Porpaca Parlamento de la Popoloj forte deklaris, ke la milito ne estas neevitebla. Ĝi forigeblas, se la progresemaj homoj de tutmondo unuece kontraŭstaras al ĝi, al militpreparoj de la imperiistoj. Tie ĉi staras nia granda rolo organizi ĉiujn pacamajn homojn klarigante al ili, ke ami la pacon ne sufiĉas, ke estas necesa konstanta, persista, ĉiutaga batalo por ĝia konservo, por certigo de trankvila vivo por ni ĉiuj, por niaj infanoj, por la tuthomara kulturo. La granda plimulto de la homaro estas arda amantaro de la paco. Do nia tasko estas vekti tiun virtualan forton, organizi, entuziasmigi, flami ĝin por la celkaŭzo de la paco sur la tergloblo.

En tiu nia klopodado ne lastloke staras la tasko por disvastigo de nia presorgano „Paco“. Ĝi estas unika tiaspeca revuo — organiza porpaca, scia, kultura, literatura. Ĝi ne nur certigas nian interligon, niajn kontaktojn, ĝi ludas rolon de organizanto, informanto, propagandanto, instrumento por interŝanĝo de kulturaj valoroj, por interkonatigo de la popoloj. Ĉar ja tiuj povus interfratigi kaj indigne rifuzi fratmortigan militon, nur se bone konas unu la alian. Por bone plenumi tiun sian rolon la revuo bezonas konstantajn zorgojn de la tuta MEM-aktivularo. La unua zorgo rilatas al ĝia ĉiam pli granda disvastigo. Eĉ en iujn eŭropajn landojn ĝi iras en tre malgranda kvanto. Ŝajnas al ni, ke ĝi meritas kaj havas la necesajn ccojn kaj kondiĉojn estiĝi unu el la plej disvastigitaj kaj plej popularaj Esperanto-revuoj. Ĝia varia enhavo, literaturaj kaj prilingvaj — esperantologiaj kaj interlingvistikaj — materialoj, verkitaj de plej elstaraj en la esperantista mondo interlingvistoj kaj esperantologoj, ĝia bela ekstera aspekto garantias tiujn kondiĉojn. La dua zorgo rilatas al regula kunlaborado. Sendu materialojn por la rubriko „El la vivo de MEM“. Ĝi estas plej grava por diskonigo de la aktiveco de la sekcioj, por interŝanĝo de sperto, por organizo de similaj aranĝoj en aliaj landoj. Bonvenaj estas ankaŭ koncizaj artikoloj pri konvenaj temoj, rakontoj kaj aliaj literaturaĵoj, humoraĵoj kaj kromaj interesaj kontribuaĵoj. Esperimu viajn opiniojn pri la enhavo, pri la redaktado. La alta kvalito de „Paco“ kaj ties amasa disvastigo prezentas premison por bone organizita kaj funkcia MEM.

Ni aŭdigu nian forton:

Ne — al la milito!

Ne — al la vetarmado!

Ne — al la imperiismaj planoj!

Ni povas bari la vojon de la milito, se ni unuece agus.

Violin Oljanov

PACAMIKO PODKAMINER 80-JARA

Ĉu estas leganto de „Paco“ kiu ne konas la nomon de nia elstara pacamiko S. N. Podkaminer? De multaj jaroj li tre aktive partoprenas la esperantistan pacmovadon kiel membro de l'Internacia Komitato de MEM kaj dum certa periodo ties vicprezidanto. Pro siaj grandaj meritoj li estiĝis unu el la unuaj MEM-aktivuloj distingita per la Honora Insigno de MEM.

Sian jubilean datrevenon Podkaminer renkontas kun granda profesia kaj esperantista, notinde porpaca aktivado. Li multajn jarojn laboris kiel docento en la Aertrafika Altlernejo de Leningrado kaj preparis multenombrajn fakulojn por la soveta aertrafiko. Kiel scienculo kun alta prestiĝo li estis elektita rektoro de tiu fama altlernejo. Kiel oficiro dum la Dua Mondmilito li batalis kontraŭ la hitleristaj invadintoj ĝis ilia plena frakaso. Poste kunlaboris en la soveta okupacia zono por reorganizo de la tuta kultura laboro sur la principoj de humanismo kaj internacieco.

En la esperantista movado Podkaminer ekaktivis jam en studenta aĝo. En 1920 li esperantistiĝis kaj jam en 1921 partoprenas la laboron de la fonda kongreso de Sovetrespublikara Esperantita Unuiĝo (SEU). En 1926 oni lin elektas sekretario de LKK de la kongreso de SAT, okazinta en Leningrado. Dum sia pli ol sesdekjara esperantisteco li okupis diversajn respondecajn postenojn en la vicoj de SEU kaj elektiĝis kiel membro de ties centra komitato.

Ĉi tie mi dezirus tuŝi pli speciale lian agadon por la venko de la paco en tutmonda skalo. Edukate en spirito de konsekvenca internaciismo kaj aktiva humanismo. Podkaminer agadas sur tiu nobla kampo nelacigeble. Ĉiu povus facile kompreni tion: kiel partopreninto en la dua mundmilito, li vidis la realan vizaĝon de la imperiismo kaj sincere kontraŭstaras ĉiujn provojn denove starigi la homaron antaŭ katastrofa mundmilito. Kun klara konscio pri la kialoj de la militoj en nia epoko, li faris ĉion eblan por la senmaskigo de la usona imperiismo kaj ties helpantoj. Sian talenton de scienculo kaj publicisto li dediĉis al tasko malfacila, sed decida por la estonteco de la vivo sur nia planedo. Kaj kiel hardita batalanto, li ne malesperigas antaŭ la malfacilaĵoj de la pacbatalo, konservante sian optimismon kaj kredon je la fina venko.

Jen kelkaj momentoj el lia porpaca agado kiel MEM-ano.

En 1973 Podkaminer partoprenas la mondan forumon de pacamaj fortoj, okazintan en Moskvo. Li estas ano de la kvarmembra oficiala delegitaro de MEM en tiu grandioza pacforumo. La ceteraj tri estis Gilbert el Francio, Bjelanoviĉ el Jugo-

slavio kaj Aleksiev el Bulgario. Kiel konate, dum la tagoj de funkciado de tiu forumo estis subskribitaj inter MEM kaj Monda Packonsilio dokumentoj por kunlaborado sur la kampo de pacbatalo. Krome, la delegitaro distingis la prezidanton de MPK s-ron R. Ĉandra per la Honora Insigno de MEM. En tiu tre signifa por MEM kontakto kun MPK kaj preparo de la koncernaj dokumentoj en angla lingvo la plej granda parto de la laboro estis plenumita de pacamiko Podkaminer.

Mi konas persone la laboron faritan de li en pluraj ĝeneralaj konferencoj de MEM. Lia saĝa, argumentita pozicio pri la traktataj problemoj estas ĉiam akceptata kun granda atento. Mi mencias nur unu-du faktojn. En Sofio en 1963 devis esti aprobita nova statuto de MEM. Okazis vigla disputo kun preskaŭ kontraŭaj deirpunktoj. La aktiva partopreno de Podkaminer helpis al la konferenco trovi la ĝustan solvon. La aprobita tiam statuto servis al la agado de MEM en daŭro de 15 jaroj. Kaj kiam en Varna estis denove diskutitaj kelkaj proponoj de la ĝenerala sekretario Gilbert pri statutŝanĝoj, Podkaminer denove esprimis sian starpunkton. Oni aprobis la novajn ŝanĝojn sen tuŝi tamen la bazajn principojn de la ĝistiamaj statuto.

Li manifestis iniciatemon, insiston kaj kunlaboremon en la preparataj kaj eldonataj en Sovetunio landaj numeroj de „Paco“ — ĉiam riĉenhavaj, luksaj, variaj, bone ilustritaj. Liajn artikolojn oni povas legi ankaŭ en la publikaĵo de Soveta Sekcio de MEM „Por la paco“, ankaŭ en apartaj broŝuroj de MEM. En gravaj neesperantistaj informorganoj de Sovetunio aperis liaj aŭ en kunlaboro kun aliaj elstaraj sovetaj esperantistoj artikoloj, radioelsendoj. Li senlace klarigis al la vasta publika opinio la eblecojn de la esperantistoj esti utilaj al la komuna pacbatalo en la tuta mondo. Kun solida teoria kaj praktika sperto li rilatas al ĉiu problemoj de la agado de MEM. Ne hazarde, en la Asocio de Sovetaj Esperantistoj li estis elektita vicprezidanto de ASE kaj gvidanto de Soveta MEM-sekcio.

La adeptoj de MEM esprimas koran dankon al la jubileulo pro lia konsekvenca kaj abnegacia laboro sur la tereno de la pacbatalo en soveta kaj monda skalo. Ni elkore deziras al li sanon kaj pluan sukcesplenan agadon por ruinigo de la krimaj militplanoj de la imperiistoj ekbruligi novan mundmiliton, por la triumfo de la afero de paco, sekureco, kunlaborado kaj interkompreniĝo de la popoloj, sendepende de ties sociaj sistemoj.

Nikola Aleksiev
honora prezidano de MEM



Ukrainio

Novembre 1980 en urbo Ternopol estas fondita Esperanto-Societo de internacia amikeco „Amikeco“. Por montri al ne-esperantistoj, ke Esperanto taŭgas por internaciaj ligoj ni petas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj unuopajn esperantistojn en la tuta mondo sendi al ni leterojn aŭ poŝtkartojn kun bondeziroj kaj proponoj pri konkretaj ligoj. La alvenintajn poŝtendaĵojn ni uzos kiel propagandmaterialon por Esperanto. Ĉiu letero aŭ karto estos respondita. Nia adreso: Esperanto-societo „Amikeco“, 282001 Ternopol, p. k. 83-USSR

USSR

Kune kun la tuta soveta popolo, kune kun ĉiuj homoj de bona volo ni profunde maltrankviliĝas pro la politika kurso de la registaro de Usono.

Ni memoras: sennuba ĉielo super la planedo estis konkerita per tre multekosta prezo!

En ni parolas la sango de niaj patroj, kiuj fordonis sian vivon en la batalo kontraŭ la bruna pesto de faŝismo.

Ni postulas: ĉesigi militan psikozon kaj vetarmadon, fini krudan enmiksiĝon en aferojn de popoloj de aliaj landoj.

Ni alvokas ĉiujn esperantistojn aktivigi sian agadon kontraŭ la novaj raketoj de Usono en Eŭropo, por malarmado kaj firmigo de la malstreĉiĝo!

Jaroslavlja E-klubo
(Sekvas subskriboj)

Krasnodaraj esperantistoj aktive komencis novan lernojaron. Komence de septembro 400 afiŝoj kun invitoj al E-ekspozicioj, E-kursoj ornamis la urbon. En septembro-oktobro estis aranĝitaj 3 koncertoj, 7 prelegoj pri Esperanto, 2 grandaj ekspozicioj „Esperanto servas al paco“, en kiuj partoprenis pli ol 500 personoj. Ĉ.200 urbanoj aliĝis al E-kursoj.

En la urbo funkcias 10 kursoj de Esperanto por komencantoj en la E-klubo, Palaco de pioniroj, teritoria domo de laboristoj pri klereco, teritoria biblioteko, mekanika lernejo, agrikultura instituto, Ŝtata universitato. En la universitato funkcias fakultato de Esperanto en kadre de la fakultato pri sociaj profesioj. Post du jaroj da studado la studentoj ricevas diplomon kun rajto instrui Esperanton. Ĉiuj dezirantoj kontakti kun krasnodaraj esperantistoj skribu amase al Su-350000 KRASNODAR p. k. 18. Esperanto-organizaĵo USSR.

1) Nia verkisto Nguyen Hai Trung faris 3 prelegojn en ripozdomo Thanh La de urba sindikato, por oficistoj, instruistoj kaj laboristoj, kiuj ripozas en tiu bona bela sanatorio de Hochi Minh urbo. Akompane k-do N. D. Khanh prezentis diversajn esperantaĵojn ekspozicie, en kiuj troviĝas la revuoj „Paco“, „Esperanto“ de UEA, „Heroldo de Esperanto“ kaj ĉefaj vjetnamaj eldonaĵoj. La aŭskultantoj proponis fondon de E-sekcio, kursoj kaj disdonadon de E-propagandiloj, lerniloj ktp.

2) Por celebrado de 3 grandaj jubileoj de 1980 de la Vjetnama Socialisma Respubliko, niaj esperantistoj en distriktoj 1+3 (Hochi Minh urbo) organizis „Thang Nam Esperantistan Renkontiĝon“.

porpaca rezolucio – danĝera

Bulgario

En la apudmara urbo Varna la 20-an de decembro 1980 okazis unika laŭ sia speco renkontiĝo de veteranoj, kiuj aktivis en la loka Esperanto-societo en la jaroj 1934—1944. Tio estis tempo de plej kruela faŝismo en Bulgario, tempo de malliberejoj kaj koncentrejoj, de amasaj murdigaĵoj kaj pendigiloj, de senrajtigo kaj subpremo de la libera penso, de surstrataj protestaj manifestacioj kaj partizana movado. Tiam en la Esperanto-societo „Albatroso“ en Varna aktivis multaj progresemaĵoj kaj revoluciaj junuloj, kiuj donis progreseman direkton al la ĝenerala agado de la societo. Ĝi estiĝis kultura centro de la progresema junularo. Ne hazarde la faŝistoj ĵetis dufoje bombojn en ĝian klubojn. Ja tiam mankis liberaj demokratiaj partioj kaj kontraŭfaŝistaj kaj laboristaj organizaĵoj.

Kaj jen. . . eniras en la salonon de restoracio „Sevastopol“, kie okazas la renkontiĝo, grizharaj samideanoj, renkontataj ĉe la pordo de simpatiaj junaj esperantistinoj, kiuj donacas al ili dianton kaj kroĉas memorinsignon. Kolektiĝas 55 veteranoj nun loĝantaj en diversaj lokoj de la lando. 40 el ili aktive partoprenis la rezistan movadon, la kruelan kontraŭfaŝistan batalon. Ĉeestis la vesperon ankaŭ 30 gastoj kaj observantoj. Ja vekis grandan intereson tiu ĉi iniciato! Kortuŝe penis sin rekoni malnovaj amikoj kaj kunbatalantoj ne renkontintaj unu la alian 40 kaj pli da jaroj. En la memoro restis la gaja knabina vizaĝo kaj. . . subite antaŭ la rigardo aperas sulkita de la tempo vizaĝo! Ĉirkaŭbrakoj kaj eĉ larmoj ne mankas.

La renkontiĝo malfermiĝas de la prezidanto de la iniciata komitato Cvjatko Jolov. Li substrekis, ke malfeliĉe ne ĉiuj povas partopreni en tiu kortuŝa solenaĵo. Dekoj da fervoraj esperantistoj pereis en la batalo. La ĉeestantaro stariĝas en honoriga silento. Per vortoj de estimo kaj danko salutis la veteranojn en la nomo de la Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista

Asocio en Varna ties sekretariino Saša Nedeva. La vicprezidantino de la Distrikta Komitato por Defendo de la Paco Kina Haĝieva substrekis la komunajn idealojn de la pacbatalantoj kaj la esperantistoj por konservo de la paco. En la nomo de la Centra Estraro de BEA salutis la veteranojn ĝia sekretario Dimitr Papazov. Per eltiraĵoj el arkivoj li evidentigis, ke la tiama regpotenco timis la antifaŝistan etoson en la esperantista societo kaj ĝenerale inter la esperantistoj, ĉiam suspektis kaj zorge observis ilian agadon. Li kroĉis al pluraj meritplenaj partoprenantoj la honoran insignon de BEA. En la nomo de Esperanto-societoj en Varna salutis Lazar Andreev.

Veteranoj rakontis pri sia sperto de agado en tiuj malpacaj malfacilaj tempoj, pri interesaj okazoj. Kun granda intereso oni aŭskultis la ege interesan rakonton de la ĉefredaktoro de „Paco“ Violin Oljanov, kiu en tiu tempo estis unu el la gvidantoj de la kontraŭfaŝista rezistado ĉe la Esperanto-societo. Li malkovris nekonatan flankon de tiu batalo, pri ekzisto de sekreta organizaĵo, kiu per sia influo fakte direktis la agadon de la Esperanto-societo en flankon de batalo kontraŭ la reakciajn ideojn de la faŝismo, kontraŭ la preparojn al milito, kontraŭ la senrajtigo de la popolo. Kortuŝa estis lia rakonto pri tio, kiel obstine ili batalis por atingi celojn nun aspektantajn tre facilaj, ekzemple akceptigi porpacan rezolucion. Tutan horon kaj pli oni devis argumenti en kunveno de la Esperanto-societo en 1936, ke ili kiel veraj adeptoj de la ideoj de Zamenhof por paco kaj frateco inter la popoloj devas kontraŭstari la preparojn al milito, devas kontribui al la batalo kontraŭ la jam ŝvebantajn hajlajn nubojn super Eŭropo. La prezidanto de la kunveno rigore depuŝis la „atakojn“ de la progresemaĵoj esperantistoj motivante, ke tio kompromitus la societeton, ke tio estas danĝera ktp. Kaj li eĉ ne voĉdonigis la proponon.

La progresemaĵoj esperantistoj tamen ne nur per vortoj, sed ankaŭ per agoj kontraŭbatalis la agreseman kaj militeman internacian faŝismon. Ili starigis ligan kun batalanta Hispanio, sendis kuraĝigajn leterojn kaj monhelpojn, ricevadis de tie literaturon, kiun en tradukoj disvastigis. . .

La renkontiĝo estis bunte garnita inter la salutoj kaj la rememoroj per artaj plenumoj, kiuj kontribuis por la tre agrabla kaj intima etoso de la vespero. La ĉeestantaj junaj esperantistoj avido „englutis“ la interese gajnitaĵojn, kiuj prezentas riĉan trezoron por la historio de la Esperanto movado en Bulgario, modelan ekzemplon por la novaj generacioj, por la plua disvolviĝo de la Esperanto-movado.

Tio estis vere neforgesebla renkontiĝo, grava esperantista okazintaĵo.

Saša Nedeva

ekumena voĉo de paco

Bulgario. Kiel sciante, en la ĉefurbo Sofio okazis en la tagoj de 23-27. 9. 1980 granda packongreso — La Porpaca Mondparlamento de la Popoloj, kiun partoprenis pli ol 2200 delegitoj el 134 landoj. Prezidis ĝin la prezidanto de la Mondpaca konsilantaro Romesh Chandra, en la nomo de la gastiganta lando parolis la prezidanto de la ŝtatkonsilantaro de Bulgario Todor Jivkov. Salutmesaĝojn alsendis ĉefoj de multaj ŝtatoj, plue eĉ la ĝenerala sekretario de UN Kurt Waldheim k. a.

La Mondparlamenton kunvokis la Mondpaca konsilantaro cele kunvenigi homojn el ŝtatoj de diversaj sociaj strukturoj, de plej diversaj politikaj konvinkoj, religiaj konfesioj kaj aliaj diferencoj, por unuigi ilin al ankoraŭ pli intensa batalo por la noblaj idealoj de la homaro kaj per ili — en la nuna komplikita internacia situacio — mobilizi la tutmondan publikan opinion al decidaj agoj por sekurigo de la tutmonda paco.

La Porpacan Mondparlamenton de la Popoloj ĉeestis ankaŭ diversaj ekleziuloj — de metropolitaj, episkopoj ĝis simplaj pastroj. Multnombre estis reprezentitaj precipe la ortodoksaj eklezioj el Sovetio kaj Bulgario kun iliaj patriarkoj Pimen kaj Maksim, Kristana packonferenco, Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj k. a. Plue partoprenis eĉ anglikanoj, protestantoj, islamanoj, budhanoj k. a. Vatikano sendis sian observanton.

La ĉeestintaj ekleziuloj partoprenis diskutojn en la plenkunveno, eĉ en diversaj fakaj kunsidoj kaj mem okazigis — kadre de la kongreso, en unu el la salonoj de la bulgara parlamento, fakte universale, ekumenan kunvenon. Partoprenis ĝin pli ol 100 anoj de plej diversaj religioj, sub prezido de la belga kanoniko Raymond Goor, portanto de la pacpremio de Lenin.

Enkonduke prelegis la plej alta reprezentanto de la bulgara ortodoksa eklezio, patriarko Maksim, poste parolis 40 religiuloj de plej diversaj eklezioj. Ĉiuj prijuĝis la mondproblemojn de propra religia konvinko, sed ĉiujn unuigis la sama ideo: vivo en paco estas sankta, netuŝebla rajto de ĉiu homo kaj nacio, tial porpaca laboro devas fariĝi unuaranga religia tasko.

En la postaj diskutoj estis interŝanĝitaj spertoj el la religia paca servo en diversaj landoj kaj proponataj vojoj, per kiuj — en kadro de tiu ĉi religia paca servo — eblos sukcese realigi la programon de la Ĉarto de la Mondparlamento de Popoloj por Paco. Tiacele estis rekomendite fon-

di — kadre de Mondpaca Konsilantaro — komunan religian sekcion, kiu kunordigadus la porpacan laboron de diversaj religiaj organizoj en la tuta mondo, por akceli la malarmadon kaj sekurigi la tutmondan pacon.

Finnlando. La finna ekumena konsilantaro aranĝis en Helsinko malarmadan konferencon. Partoprenis ĝin eĉ la prezidanto de la komisiono por internaciaj rilatoj de la Mondkonsilantaro de eklezioj Olle Dahlen, kiu esprimiĝis por aktiva partopreno de ĉiuj religiaj rondoj en celkonscia mildigo de la internacia streĉiĝo.

Aŭstralio. La episkopaj konferencoj el la regionoj de Pacifiko — Aŭstralio, Novzelando, Papuo-Novgvineo, Salomona Insularo, interkonsentis reciproke kunlaboron por spirita, socia, ekonomia eĉ materia evoluo de la loĝantaro, cele al disvolvo de ĝiaj memdestino, aŭtonomio kaj ŝanĝo de la nejusta socia strukturo. Tiu ĉi programo estis starigita dum renkontiĝo de reprezentantoj de la episkopaj konferencoj, okazinta en la aŭstralia urbo Sidnejo.

Ĉeĥoslovakio. En la tagoj 8—12. 9. 1980 okazis en urbo Bratislava kunveno de la Internacia Sekretariato de la Kristana Packonferenco, kaj en la tagoj de 17—18. 9. 1980 kunsidis Komisiono por homaj rajtoj de la Kristana Packonferenco en urbo Prešov. Ambaŭ kunvenoj estis destinitaj precipe al preparlaboroj por kunsido de la Komitato de la Kristana Packonferenco, okazinta en oktobro 1980 en Eisenach (GFR) kaj por konferenco de la Subskribintoj de la Fina Akto en Helsinko okazinta en Madrido.

Germana D. R. En Leipzig okazis 5-taga, jam 4-a kunsido de la III-a sinodo de la Unio de Evangeliaj Eklezioj en GDR, kiun partoprenis ĉiuj 8 landaj eklezioj kaj multaj eksterlandaj gastoj. Estis akcentite, ke laboro por la tutmonda paco ne estas nur laŭokaza tasko, sed unu el la plej respondecaj devoj de la eklezioj en ilia servo al la homo.

Kostariko. En la ĉefurbo San José la gvatemalaj pastroj, vivantaj tie en ekzilo, eldonis proklamon, ke la gvatemala eklezio, kvankam ĝi mem estas ege endanĝerigita, terure turmentata kaj persekutata, restos fidele ĉe la flanko de la popolo kaj ĝia batalo por raito kaj libereco.

Bolivio. La bolivia ĉefepiskopo kardinalo Jorge Manrique Hurtado proklamis en intervjuo por la hispana gazeto „El Pueblo“, ke ankaŭ li devas ĉiutage konsideri, ke li estos murdita. Nome, la polica ĉefo de la faŝista hunto indikis lin kiel „faman agitanton kaj ribelulon“.

Aŭstrio — Sovetio. La delegacio de la viena fondaĵo „Pro Oriente“ efektiviĝis en septembro 1980 dekunutagan viziton al Sovetio. La delegacion gvidis la viena kardinalo Franz König kaj la aŭstria eksministro Piffl-Percevic. Ili renkontiĝis kun la gvidantaj aŭtoritatuloj de la rusa ortodoksa, armena apostola kaj gruzia ortodoksa eklezioj. Post la reveno kardinalo König publike parolis en la viena urba salono, kie li proklamis, ke necesas likvidi la militon kiel ilon

de politiko por solvado de konfliktoj, postulante tujan haltigon de armado kaj serĉadon de pacaj vojoj al la tuthomara harmonio.

J. K.



NEDERLANDA ESPERANTO KONGRESO

De la 24a ĝis la 26a de aprilo 1981 okazos la Nederlanda Esperanto Kongreso en la moderna konferencejo „De Bron“, kiu troviĝas en la komunumo Dalŝen, en la orienta parto de Nederlando. La regiono estas riĉa je naturo kaj la konferencejo situas apud la rivero Vecht. Ekzistas eĉ ebleco kampadi apud la kongresejo.

La kongresejo estas bone atingebla per aŭtomobilo kaj ankaŭ trajne kaj aŭtobuse. Por tiuj, kiuj alvenos vendrede (inter la 16a kaj 18a) estos organizita veturado el la stacidomo de Dalŝen al la kongresejo.

Centra temo de la kongreso estos „Energio“, lige al la okazonta en Nederlando t.n. larĝskala socia diskutado pri energioprovizado. Pri tiu temo prelegos la franca medio-aktivulo Roland Leveaud kaj la hungara scienculo prof. Otto Haszpra. Lastmenciita gastu ankaŭ prelegos pri la aplikado de Esperanto en la sciencoj. Estas la intenco eldoni specialan kongresan dosieron pri la energioproblemo. Dimanĉe posttagmeze okazos kulmina forumdiskutado kun partopreno de diversaj nederlandaj politikistoj en antaŭbalota periodo.

Dum la kongreso okazos sabate la jarkunvenoj de kelkaj el la nederlandaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj ĉiuj kune organizis la kongreson, la unuan komunan kongreson. La teatra grupo TESPA el Parizo prezentos sabatvespere teatraĵon de la moderna franca aŭtoro Boyer.

La kostoj de la kongreso, inkl. ĉion, estas 137,50 gld., se oni aliĝas antaŭ la komenco de la Jaro 1981a. Por gejunuloj estas malpli kosta tarifo, nome 100 gld., se oni pretas dormi en granda salono. Aliĝilojn oni povas peti ĉe la kasisto de la Nederlanda Esperanto-Kongreso, Hoeveweg 18, NL 8394 VR De Hoeve, Nederlando. Ĉe li oni samtempe povas mendi kongresglumarkojn (0,75 gld. por folio de 10 markoj), kiuj montras la emblemon de la komunumo Dalŝen kaj modernstile mencias pri la kongreso.

Ni kore bonvenigos eksterlandajn partoprenantojn, do NE HEZITU!

Por pliaj informoj: sekr-ino de Nederlanda Esperanto Kongreso — s-ino I. Boode, Polderlaan 46a, NL-3074 ME Rotterdam.

LINGVAJ TEMOJ

Esperanto — fremdlingvo por ciuj

Pri la rolo de Esperanto rilate al venkado super la lingvaj barieroj parolis nia korespondanto Aleksandr Ĥarkovskij kun la fama soveta lingvisto Paul Ariste, membro de la Akademio pri Sciencoj de la Estona SSR.

Pri Ariste en Estonio cirkulas legendoj. Oni diras, ke ne estas iu lingvo en la mondo, en kiu li ne povus interkompreniĝi. La estro de la katedro pri finn-ugraj lingvoj ĉe la universitato en Tartu, unu el la plej malnovaj en Eŭropo, pesedas dekduojn da lingvoj de la nuntempo kaj de la antikva epoko, disvastigitaj kaj ekstreme raraj. Okaze de kongreso li interparolis kun rumanaj sciencistoj. . . ciganlingve.

En la mondo de la lingvosciencistoj Paul Ariste estas konata nelacigebla vojaĝanto kaj esploranto pri idiomoj de malgrandaj popoloj. La verkita de li gramatiko de la lingvo de *vodi* (malgranda popolo en la nordo de USSR) antaŭ nelonge estis publikita en Usono, en la ŝtato Indiana. Samtempe li estas eminenta interlingvisto, specialisto de tiu scioregiono, kiu sin okupas pri la studado de lingva estonto de la homaro. Antaŭ nelonga tempo, okaze de lia sepdeka naskiĝtago, la sciencisto estis dekorita per la Ordeno de „Amikeco de l'Popoloj“.

Li aĝis dekkvar jarojn, kiam skribis sian unuan verkon scienca — en Esperanto. Jardekojn pli malfrue li fariĝis membro de la Internacia Akademio de tiu lingvo.

Mi delonge kaj bone konas profesoron Ariste, renkontas lin en Esperanto-forumoj kaj eĉ vizitas lin en Tartu.

Ĉi-foje ni renkontiĝis en studenta kafejo. Malalta mezepoka volbaĵo, la trikoloraj ĉapoj de la Tartu-aj studentoj, ĝentila „tere“ (Bonan tagon!). . . La konversacio kiel ĉiam okazis en Esperanto.

H — Mi scias, profesoro, ke vi posedas Esperanton de duona jarcento. Ĉu estis juneca entuziasmo, kiu daŭris la tutan vivon, aŭ la konviko, ke tiu lingvo posedas internacian gravecon kaj futuron?

A — Kaj la unu kaj la alia. Ĉu vi dum internaciaj kongresoj neniam havis eblecon restadi en la kabinoj, en kiuj laboras la interpretantoj? Mi ofte estis tie. Tiuj homoj faras utilan, sed malfacilan kaj penigan laboron, por ke la sidantaj en halo povu aŭdi en siaj aŭskultiloj la referaĵojn en siaj patrolingvoj.

La loĝantaro de la mondo interkompreniĝas per

miloj da lingvoj. Sed eĉ la plej bonaj haloj, kiel ekzemple la kongrespalaco en Moskvo, disponas pri la ebleco de la tradukado nur en dudek ĝis tridek lingvojn, kaj nur en la plej disvastigitajn. Kio do malhelpis pli grandan lingvointerkompreniĝon? Ĉu la tekniko? Ne. Pli vere estas — se oni tiel povas diri — malfacilecoj de la homa naturo. Kiom da interpretantoj necesas por traduki samtempe en, mi diru, tridek lingvojn? Kiom vi opinias? Preskaŭ mil. Ili devas esti ŝanĝataj minimume duonhore, ĉar pli longe neniu eltenas. La angla sciencisto John Bernal skribis, ke oni devus ellabori radikale pli bonan rimedon de interkompreniĝo, precipe en nia tempo, ĉar la mondo fariĝos efika scienca kaj ekonomia komplekso, en kiu la babilona lingvokaoso estas terura reto.

Tia rimedo de interkompreniĝo ekzistas. Estas la internacia lingvo Esperanto. En la Esperanto-kongresoj ne ekzistas interpretantoj. Iliaj delegitoj ĝuas tion, kion Antoine Saint-Exupery signas „pompo de homa interkompreniĝo“. Nu, tion vi mem ja scias. . .

H. — Tamen mi deziras paroli kun vi pri miaj duboj. Kelkfoje oni diras: por kio oni bezonas internacian lingvon? Mi simple lernas la tri aŭ kvar el la plej disvastigitaj kaj la lingvoproblemo por mi jam ne ekzistas. Ĉu estas tiel, profesoro, kaj kiom da lingvoj vi parolas?

A. — Ni nombu. Miaj gepatroj kompreneble parolis kun mi estone. Ne malproksime de nia loĝloko loĝis rusoj kaj germanoj. Tie mi lernis iliajn lingvojn. Tiutempe ni transloĝiĝis Tallinn-on, kie mi amikiĝis al svedaj laboristoj. Sed kia amikeco estas, se oni ne povas interkompreniĝi ĝuste? Do mi lernis la svedan lingvon. Sed por la korespondado kun amikoj el aliaj landoj ankaŭ tio estis tro malmulte. Do mi okupiĝis pri Esperanto.

Kompreneble mi posedas la unuopajn lingvojn diferencgrade. Estone, finne kaj germane mi parolas, pensas kaj skribas; facile mi povas interkompreniĝi ciganlingve; mi ankaŭ parolas hungare kaj mordvine, sed ne flue. Angle, svede kaj ruse mi ĉefe legas. Krome kelkaj dekduoj da lingvoj troviĝas en mia memoro, kaj mi aktivigas ilin laŭ mia bezono.

Kelkiuj „kolektas“ lingvojn kaj deziras fariĝi poliglotoj. Sed mi scias proprasperte: por konservi lingvojn en memoro necesas ĉiutaga laboro.

Modifante proverbon, mi deziras diri: „Ekzistas multe da lingvoj, sed la vivo estas mallonga.“ Por kompreni nur duonon de la homaro, oni devus posedi amason da lingvoj — ĉinan, anglan, hispanan, araban, hindan, japanan, germanan kaj francan lingvojn.

H — Sed el tiu nombro oni do povus elekti unu kaj proklami ĝin mondlingvo. Tiam proponon mi ofte aŭdis. Plej ofte la angla lingvo estas menciata por tiu rolo de „moderna latino“.

A — Tio ne estas ebla. Tiam la parolantoj de miloj da aliaj lingvoj prave eligus krion de indigno. V. I. Lenin plej profunde pravis skribinte, ke neniŭ nacio kaj neniŭ lingvo rajtas posedi privilegiojn.

Male, Esperanto estas neŭtrala lingvo, kiu ne igas senegalrajtan situacion al iu nacio. Ĝi vere estas lingvo de paco kaj amikeco. Ni memoru, kiamaniere ĝia kreinto d-ro Ludoviko Zamenhof procedis. Li eliminis ĉefe el la latina lingvo, internaciajn vortojn, kiuj jam pasis la fajroprovon de aliaj lingvoj, ligis ilin per simpla, logika gramatiko sen escepto kaj donis al tiu miksaĵo la muzikecon de la itala lingvo. Esperanto fariĝis esprimplena kaj simpla lingvo, kiun ĝenerale oni povas lerni dum duona jaro. Sed ĝi fariĝis samtempe egalvalora lingvo, en kiun majstroverkoj de la mondliteraturo—Dante, Shakespeare, Tolstoj kaj Puŝkin—estis tradukitaj. Sole en USSR verkoj de Soloĥov, Majakovski, Jesenin, Gajdar kaj Garcia Lorca estis eldonitaj en la pasintaj jaroj. En Esperanto jam aperas pli ol cent revuoj, inter ili la sovetaj „Paco“ kaj „Por la paco“.

La prezidantaro de la Akademio pri Sciencoj de USSR komisiis antaŭ nelonge la instituton pri lingvosciencoj de la akademio „okupiĝi pri helplingvo de la internacia interkompreniĝo“. Nun tiu instituto eldonis traktaton „Problemoj de interlingvistiko“, en kiu oni konkludis, ke Esperanto estas la sola artefarita lingvo, kiu taŭgas por internacia interkompreniĝo.

H — Ĉu artefarita?

A — Esperanto estas en pli alta grado „artefarita“ ol etnaj lingvoj, sed ĝi estis priŝlifita en proceso de interkompreniĝo fare de amasoj kaj de verkistoj, kiuj verkis en Esperanto kaj per ĝia helpo.

Lingvo komprenebla por ĉiuj homoj estas pramalnova revo de la homaro. Ĝian speguliĝon ni trovas en la biblio, en la legendo pri la turokonstruado de Babilono: Ĉar la homoj provis konstrui turon, kiu estis atingonta la ĉielon, Dio ilin punis konfuzante la lingvojn de la homoj kaj per tio prenante al ili la kapablecon kompreni unu la alian. De tiu mirakla turo, kiu estis ebligonta la ĝis la ĉielo etendiĝantan revon, la homoj konstruis stalojn kaj transformiĝis mem preskaŭ en bestojn. Eĉ en biblia interpretado do multlingveco signifas „malbeno de la Ĉiopova“.

Ni trovas la revon pri komuna lingvo jam en verkoj de Platon, Descartes, Leibnitz, Voltaire, Montesquieu kaj Campanella. Sed nur ĉirkaŭ la fino de la deknaŭa jarcento — dank' al progreso kaj al la rimedoj de interkompreniĝo — la kondiĉoj estis faritaj por tia lingvo, kiu kunekzistante kun naciaj lingvoj kapablas fariĝi dua lingvo por ĉiu homo. Entuziasmuloj de Esperanto jam en nia tempo estis Lev Tolstoj, Maksim Gorkij, Herni Barbusse, Romain Rolland,

Lu Sin, Konstantin Ciolkovski kaj Vladimir Obruŝĉev.

H — Al kiuj cirkonstancoj ŝuldas Esperanto sian disvastiĝon inter la pacamikoj? Kaj fine: kiom da esperantistoj ekzistas en la tuta mondo?

A. — Specialistoj ofte interkompreniĝas helpe de grafika skribado kaj formuloj; ili pli ofte posedas fremdlingvojn. Sed pacbatalantoj plej ofte estas simplaj homoj. Eĉ okazas, ke en kelkaj landoj mankas monrimedoj por pagi interpretistojn por iliaj kongresoj. En tiaj kazoj Esperanto povas helpi.

Jam en la jaro 1953 estis fondita la internacia organizaĵo „Mondpaca Esperantista Movado“ (MEM). En la jaro 1973 Nikola Aleksiev, tiama prezidanto de MEM, kaj la ĝenerala sekretario de la Monda Packonsilantaro, Romesh Chandra, subskribis en Moskvo komunan deklaron pri kunlaboro de ambaŭ organizaĵoj, kiu rekomendas utiligi „la internacian helplingvon Esperanto por firmiĝo de internaciaj interrilatoj“.

UEA, fondita en la jaro 1908, nombras proksimume tridek mil membrojn en sesdek landoj. Sed tio kvazaŭ estas nur la kerno. Unu el la Esperanto-lernolibroj en USSR estis vendita en naŭdek ses mil ekzempleroj. Same rapidege estis venditaj Esperanta-rusa kaj rusa-Esperanta vortaroj en preskaŭ cent mil ekzempleroj. Mi ne dubas pri tio, ke la Esperanto-lernolibro de Magomet Isajev kaj Zinaida Semjonova, kiun eldonos „Nauka“-eldonejo en proksima tempo, havos saman bonsorton. Plue. En la jaro 1966 oni prezentis peticion al UNO enkonduki Esperanton en la lernejojn. Tiu peticio tiutempe havis jam sepdek du milionojn da subskriboj. Oni do aŭdace povas aserti, ke ekzistas milionoj da esperantistoj en la tuta mondo. Por tia juna lingvo kiel Esperanto tio tute ne estas malgranda.

Trad. M. Arnold

(El revuo „Sovjetunion heute“)

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO

Oktobro, 1980

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobado diversajn proponojn, inter si malsimilaj, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniŭ ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: „Presejoj, kiuj neposedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, jh, sh, u.“

Prezidanto: W Auld

Sekretario: D-ro A. Goodheir

A-bombo, A-energio

Estas evidente, ke ni troviĝas en la atoma erao, aŭ almenaŭ en ĝia komenco. Ĉiu renovigo de la socio alportis diskutojn kaj konfliktojn. Ĉiu invento aŭ plibonigo estas akceptata skeptike, nefide, timeme. Oni devas nur memori la vaporan kaj la elektran epokojn.

Hodiaŭ la atomenergio estas motivo de grandaj protestoj. Ne estas mia intenco kritiki mal favore tiun kriterion de la kontraŭuloj de la atomenergio, eble ili pravas, sed permesu eksponi mian vidpunkton. Por mi tiu kampanjo estas erara. Oni devas protesti senĉese kontraŭ la formon aŭ la sistemon de la atomenergia produktado. Oni devas postuli absolutan sekurecon en tiuj monstraĵoj atomcentraloj. En tiu punkto, oni devas esti tre postulemaj, neniel toleremaj.

Tamen ĉi tiu skribaĵo ne celas tiujn protestojn kontraŭ la atomenergio. La temo estas multe pli grava: temas pri la atombomboj. Kio estas pri la amaso da atombomboj ekzistantaj en la mondo? Kaj vi, arda protestanto kontraŭ la atomenergio, kion vi faras por malaperigi la danĝeron de la atombomboj? Miloj kaj miloj da homoj rifuzas la pacajn celojn de la atomo, sed ili tute silentas pri la atombomboj, kial? Ĉu la atombomboj ne estas terura danĝero por la homaro? Ĉu ne estas pli racie, ke ni protestu kontraŭ tiuj mortigiloj ol kontraŭ la atomenergio?

En nia maljuna Eŭropo, eksportanto de kulturo, progreso kaj ankaŭ mizero, troviĝas multaj atombomboj kaj multaj pli troviĝos kiam oni „donacos“ al ni se la „intelligentaj“ respondeculoj de la politiko en la okcidentaj eŭropaj lan-

doj akceptas tiun sistemon, kiun grava potenco intencas alturdi al ni, la tiel nomatan „atomombrelon“, sub kiu ĝi ruze volas kaŝiĝi.

Ni postulu absolutan sekurecon kaj adekvatan lokon por instalado de la atomcentraloj, sed ni postulu nepre la forigon de ĉiu atombombo de Eŭropo, de la mondo. Ni batalu kaj protestu senĉese, kontraŭ tiu minaco de la paco, de la homaro. Jen nia tasko, ni apliku la atomon por la paco en fidindaj kondiĉoj, sed ni rifuzu plene la atomon, kiel mortigilon.

Ofte manifestantoj protestantaj kontraŭ la atomenergion, marŝas apud tiuj oficejoj, en kiuj oni projektas tiujn terurajn armilojn, apud specialaj industrioj, en kiuj oni pretigas ĉion necesan por la konstruo de la atombombo aŭ apude de atombombaj magazenoj, ĉu tio estas logika, racia?

Verŝajne la klasikaj energifontoj elĉerpiĝas. La homaro urĝe bezonas malkovri aliajn energiajn sistemojn, por ke la vivo kaj ĉi tio, kion ni nomas progreso ne haltu kaj ni regresu al la laŭdire pli malfeliĉaj epokoj. Eble ne estos alia solvo ol tiu de la atomenergio. Sed ni tute ne bezonas la atombombojn, ni devas forigi tiun danĝeron, ni ne devas toleri ĝian reproduktadon. Ni ne toleru, ke oni altrudu al ni tiajn armilojn. La atombombo kaj ceteraj armiloj devas malaperi de la mondo. La paco kaj la homa kunvivado tion postulas.

Luis Serrano Perez
(Hispanio)

Moris Rozenfeld

(usona juda poeto 1862—1923)

* * *

Se estas la mondo dormejo por ni,
kaj songo — la viv' subĉiela,
mi volas la tagojn de l'vivo-vizi'
pasigi en songo plej bela.

Deziras mi songi pri ĝoj' kaj prosper'
samkiel altrangaj sinjoroj,
ke estu la song' pri feliĉ' kaj liber',
ne plu pri suferoj kaj ploroj.

Kaj se nia mond' estas balo, festen',
al kiuj ni estas vokitaj,
deziras mi ankaŭ gustumi sen ĝen'
frandaĵojn sur tablo lokitaj.

Ja ankaŭ al mia palato kaj lang'
plentaŭgas nutraĵoj bonplaĉaj,
ja sama en korp' mia fluas la sang'
samkiel ĉe l' mastroj palacaj.

Kaj se nia mond' estas granda ĝarden'
kun loga admir' kaj impresoj,
deziras mi vagi dum mia promen'
tutmonde, sen ies permesoj,

Deziras, ke koramatinon kaj min
la floroj plej belaj ornamu
kaj dum la promeno kun ŝi en intim'
nin flora arom' akompanu.

Kaj se nia mond' por batal' estas plac',
kie luktas malfort' kaj perforto,
mi ĵetos min kontraŭ perfort' kun aŭdac'
kaj luktos je vivo kaj morto.

Ne ĉesos batali leone ĝis fin'
mi kontraŭ subprem' kaj perforto,
kaj kuglo fatala se trafos do min
mi ridos renkonte al morto.

El la jida*: Beno Berin

*Jida — judgermana lingvo



Pro la granda intereso al la Pospaca Mondparlamento de Popoloj, okazinta de 23-a ĝis 27-a de septembro en Sofio, kaj por ke pli multe da homoj ekkonu la plej gravajn manifestaĵojn de paco, kies organizanto estis Bulgario, kaj ankaŭ kun la „pacaj poŝtmarkoj“, la redakcio de ĵurnalo „Oteĉestven Front“ (Patrolanda Fronto) kaj la Unuiĝo de Bulgaraj Filatelitoj anoncis konkurson pri temo „Poŝtmarkoj — heroldoj de Paco“.

La pacaj poŝtmarkoj, cele al pli bona sinoptikeco, povas esti distribuitaj en kelkaj grupoj:

— poŝtmarkoj rekte ligitaj kun la konstantigo, stabiligo kaj konservo de la paco en Eŭropo kaj en la mondo. Al tiu ĉi grupo apartenas la markoj, dediĉitaj al la 9-a de Majo — Tago de Venko, en jaroj 1945, 1965, 1975 kaj 1980; packontrakto kun Bulgario, 1947; Dua Landkongreso de Paco, 1950; paco en Vjetnamio, 1973; konferenco pri sekureco kaj kunlaborado en Eŭropo — 1974; Konferenco por sekureco kaj kunlaborado — Helsinki, 1974; markbloko de 1974 kun surpriso „Beogrado 1977 — Madrido 1980“; Mondpaca parlamento de popoloj, 1980;

— *markoj dediĉitaj al internaciaj eventoj okazintaj sub pacaj sloganoj:* mondfestivaloj de junularo kaj studentaro; VII-a Asembleo de Mondfederacio de Demokratia Junularo en Sofio, 1966; VIII-a Kongreso de la Internacia Studenta Unuiĝo, Sofio, 1964; Sindikata Mondkonferenco de Junaj Laboristoj en Prago, 1959; Internacia Infan-Asembleo „Standardo de Paco“, 1979; Mondkongreso de Patrinoj en Lozano, 1955; Mondkongreso de Virinoj en Moskvo, 1963; Jaro de Internacia Kunlaborado, 1965; Internacia Jaro de Homrajtoj, 1968; 25 Jaroj de la Deklaracio de Homrajtoj, 1973; Deklaracio de Homrajtoj, 1978; Internacia Jaro de Batalado kontraŭ Rasa Apartigo, 1978; Internacia Jaro de Lukto kontraŭ Rasismo kaj Rasa Diskriminacio — 1971; 20 jaroj de l' Internacia Federacio de Batalantoj en la Rezistado (FIR), 1971; 48-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Sofio, 1963 kaj . . . 63-a Kongreso de UEA en Varna, 1978; 64-a Interparlamentara Konferenco en Sofio, 1977; Internacia Renkontiĝo de Verkistoj en Sofio, 1977; Kontrakto por Amikeco kaj Kunlaborado inter Bulgario kaj USSR, 1950; . . . kaj inter Bulgario kaj Rumanio, 1948; Kunlaborado kun Skandinavaj Landoj, 1968; Naŭa-de-Septembro-Manifestacio kun slogano por paco, 1964;

— *markoj dediĉitaj al internaciaj organizoj laborantaj por konservo de paco:* 15-jariĝo de UNO, 1960; 25-jariĝo de UNO, 1970; 30-jariĝo de UNO, 1980; 20-jariĝo de UNESKO, 1966; 25-jariĝo de UNESKO, 1971; 30-jariĝo de UNESKO, 1976;

— *markoj dediĉitaj al agantoj kontribuintaj por konservo de paco:* Renkontiĝo de gvidantoj de USSR kaj Usono, 1959; Amikeco kaj frateco de jarcentoj al jarcentoj, 1977;

— *markoj pri internaciaj filatelo-manifestaĵoj okazintaj sub pacaj sloganoj:* Filatela ekspozicio por paco kaj amikeco inter la popoloj Francio-Bulgario, 1964; Balkanfila — Varna, 1965; Filatela Mondekspozicio „Sofia'69“; Monda Junulara Filatela Ekspozicio „Juneco '74“; Filatela Mondekspozicio „Prago '78“; Filatela Mond-Ekspozicio „Filaserdika — '79“;

— *markoj kun kolombo de Picasso, simbolo de paco:* 35 jaroj de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, 1952; 40 jaroj de VOSR 1957; 30 jaroj de DPO „Septemvrijêe“ (Septembrido), 1974; Internacia jaro de Virino, 1975;

— *markoj pri grandaj personoj honoritaj laŭ iniciativo de la Mondkonsilio de Paco:* Rubens, 1977; Tolstoj, Dostoevski, Turgenev, Vereŝĉagin, Hugo, Rörich, 1977, Dürer, 1979 kaj aliaj. Aŭsume ĉ. 150 poŝtmarkoj kaj 17 blokoj.

Plej bela estas la bloko dediĉita al la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo — Helsinki, 1975. En plej originala maniero la bulgara popola pentristo Stefan Kanĉev montris pacan Eŭropon sur la fono de blanka kolombo de Picasso kun la olivarba branĉeto. Sur la malgranda folio, krom kvin markoj, estas pentritaj ankaŭ kvar vinjetoj prezentantaj stiligitan kolombon.

EDIFAJ VERSKVAROJ, 1826

GUSTA PROFETAĴO

Malsana ĝemis car': — „Ĉu resaniĝos mi? respondu do, azen'!“ — „Ho, plej potenca caro, se vi ne mortus nun, — ĝis morto vivos vi!“

Duobla du — ja kvaro!

FORTO KAJ MALFORTO

La aglo venkas falkon, kaj la anserojn falk';
timigas krokodil' ezokon;
disŝiras lupon tigro, kaj musojn voras kat', —
jes, ĉie venkas fort' dum iu ajn epoko.

SENDANGERA KVERELO

Pro ost' du hundoj en la korto
kun jelp' kverelis longe, sed disiris al dometoj en kviet':
malpac' okazas sen perforto!

LA LEGO DE L'NATURO

Floris violet' kun plaĉa bonodor'
kaj krimis kun malic' en grego lupo fia. . .
Kruela estas lup': aminda estas flor':
do ĉiu laŭ naturo sia!

PROVERBO PRAVAS

Apenaŭ lumis en kaban' kandelo unu,
lumigis oni duan — tuj heliĝis lumo.
La vortojn de maksim' antikva scias ni:
saĝuloj du ol unu kostas pli!

Tradukis: Antonina Tonti

Kampuĉio-helaj tagoj.

I Renaskiĝanta popolo

Sub tiu ĉi titolo reportero de Sunday Times (Britio), 31.08.1980 skribis:

Revizitante hodiaŭan Kampuĉion mi havas impreson penetri ĉambron de plurjara malsanulo subite superplenigita de freŝa aero. La kadavraodoro dum la pasintjara terura malsato de kiu, laŭ ĝenerala opinio, mafacile transvivus la kampuĉia popolo, nun malaperis for. La nombro de tiuj, kiuj fidis al la nacia estonteco, pli kaj pli kreskas.

Multe da ŝanĝoj. La pasintjaran januaron mi vidis mizeron stampitan sur ĉies vizaĝo. Maldikaj korpoj vagis kvazaŭ fantomoj, serĉante la perditajn parencojn aŭ iom da manĝaĵo. Penetrante la kabanaĉojn de vilaĝanoj, oni vidis malsanajn kaj malsatajn infanojn.

Kvin milionoj da loĝantoj transvivinte la genocidan reĝimon de Polpot perdis ĉion — laboron, loĝejon, familion, teron — dum la sovaĝaj klopodoj de Polpot starigi novan socion.

Eĉ la naturo estas detruita. Nur senkulturitaj kampoj, dezertaj urboj kaj vilaĝoj.

Hodiaŭ la kampoj verdas. Abunda Mekongo ruĝas pro aluvio. En multaj regionoj de provinco Kom-pong-Ĉam, akvumitaj de Mekongo kaj ĝiaj alfluantoj, la verdaj kampoj novekulturitaj sin etendas ĝis la horizonto. La tieaj vilaĝanoj jam rikoltis la fruan majan rizon. Ili kredas ricevi pli adundan rikolton de la decembra rizo. Estas notinde, ke tio ne dependas de la hidrosistemo de kanaloj fositaj nur per manoj de perfortitaj laboruloj. Miloj kaj miloj da laborskulpoj formortis pro turmenta lacego. Tiuj kanaloj fositaj laŭ nenia tekniko baldaŭ ruiniĝis. Polpot deziris starigi unikan kampuĉan civilizon, pli grandiozan ol Angkoro, sed li nur fordetrus la landon.

La nacia renaskiĝo estas pli okulfrapa en la Pnompena bazararo. Pasintjare ĝi mortis, ĉi-jaran printempon la registaro ĝin malfermis, permesante la reviviĝon de komerco kun la recirkulado de rielo (nacia monero), kiun Polpot brutale fordetrus.

Hodiaŭ la bazararo restas plena de homoj kaj varoj.

La ĉefurba loĝantaro tute elpelita de la Polpotkliko en 1975 nun nombras duonmilionon. Ĉiutage malfermiĝas novaj butikoj kaj trinkejoj.

La loĝantoj kun rideto manpremas la fremdlandanojn kaj ne kiel antaŭe rigardis ilin malfide.

Formiĝis bela folkloro teatra trupo patronata de la registaro, kun popoldanco prezentata de junuloj, ludantaj longajn flutojn el ligno kaj junulinoj dancantaj sub floraj ringoj.

... La registaro ĝuste agadas koncentrate siajn klopodojn al disdono de semoj al kampuloj kaj fidis al iliaj lertaj manoj. Plejparto da grenoj estas semita kaj laŭ oficiala plano, Kampuĉio rikoltos proksimume 700000 ĝis miliono da tunoj da rizo unuafoje de dek jaroj por sufiĉa bezono.

En tiu tempo la vilaĝanoj ne produktante rizon kaptas multajn fiŝojn aŭ kreskigas legomojn por interŝanĝi kontraŭ rizo en la libera merkato.

Ĝis nun mankas signoj pri limigo de tradicioj en Kampuĉio. Fakte la restarigo de kampuĉa kulturo estas kuraĝigata. La popolo estas libera ĉeesti la ritojn en budhaj temploj kaj vojaĝi ĉien en la lando.

Ĉiuj unuanime opinias, ke vjetnama armeo en Kampuĉio estas tre disciplinita.

Ĝenerale la kampuĉaj vilaĝanoj tre ĝojas pri la sekureco kiun la soldatoj alportis al ili kaj eĉ unu kriema nomo faris tiun observon: „Estante vera kampuĉo, mi ne ŝatas eksterlandanon, sed mi ne ankoraŭ vidis iun ajn vjetnamon, kiu mortigis homon“.

II. Pli bone, sed ankoraŭ malforte

Theodore M. Hesburgh skribis interalie en „Los Angeles Times“ (Usono) 1—9—1980:

Mi iris al Kampuĉio lastmonate, al lando dum 10 pasintaj jaroj preskaŭ detruita pro milito, genocido kaj malsato. Mi venis por propraokule rigardi la atingiĝojn de l'internaciaj helporganizoj kiuj strebas dum 10 longaj nonatoj por savi 5 milionojn da transvivintoj kaj aprezi ĉu tiuj klopodoj vere helpas al kampuĉoj antaŭeniri sur la vojo de renaskiĝo.

... Antaŭ nur 7 monatoj Kampuĉio estis elĉerpita, ĝiaj loĝantoj mortintaj, la transvivintoj terure vunditaj. Milionoj da homoj mortis pro milito, malsato, malsanoj kaj pro la genocida reĝimo de Polpot.

Hodiaŭ la parto de Kampuĉio pliboniĝas. La popolo havas sifiĉe da nutraĵo por forigi la malsaton, da semoj por esperi al bonaj rikoltoj. Ĉi-semajne miliono da kampuĉoj iros al lernejo kun lernolibroj kaj lerniloj donacitaj de helporganizoj. Sed preskaŭ ĉiuj komencas la unuan klason sendepende de sia aĝo, ĉar sub la reĝimo de Polpot ne ekzistis lernejoj.

Dum mia restado mi vidis multajn ĵusnaskitojn. Tute certe estas signo por kampuĉoj pri espero al pli hela estonteco.

En unu etapo de mia vojaĝo, mi veturis de Pnompeno al Siem Reap for en Nord-Okcidento dum 14 horoj sur vojoj preskaŭ neireblaj. Mi haltis ĉe pluraj domoj kie estas stokitaj sakoj da rizo. Gardenoj estas sterke kulturitaj. Malgrandaj butikoj laŭ vojoj vendas iom da fiŝoj kaj legomoj.

La plej sencoplena rezultato de la klopodoj pri helpo estas la kampo, kiu verdiĝas per junaj rizplantoj laŭlonge de la vojo al Siem Reap. Pli ol 60000 tunoj da semoj ekkreskas. . . . La distribuo de helpaĵoj funkcias pli bone en la lastaj semajnoj. La nutraĵoj estas liverataj al kamparanoj pli rapide. Sed estas ankoraŭ granda bezono, por ke Kampučio trapasu la malfacilaĵojn en la venontaj monatoj.

. . . Necesas multe da klopodoj, por ke Kampučio reprenu sian normalan vivon. Sed dum antaŭ nelonge regis malesperiĝo sur tiu malgranda lando, nun burĝonas plena espero. Kaj kie forblovis detruado, tie ekviglas renaskado.

III. Aktualaj problemoj

S-ro Keo Chandra, kampuĉa ministro pri kulturo kaj informado, respondis al demandoj de James Pringle, korespondanto de semajna revuo „News Week“, 8—9—1980.

D.—Kiom longe restos en Kampučio la vjetnama armeo?

R.—Ni petis Vjetnamion helpi nin por defendi nian landon. Kiam ne plu estos minaco de ĉinaj ekspansiistoj, usona imperiismo, tajlandaj reakciuloj, tiam vjetnamoj retiriĝos el nia lando.

D.—Polpot akuzis la registaron de Heng Samrin kiel perfidan reĝimon? Kio estas via opinio pri tio?

R.—Sub la reĝimo de Polpot ni devis akcepti ekspansiismon de Ĉinio kaj dum tiu tempo 3 milionoj da homoj mortis. Ni ne estas lakeoj de Vjetnamio. Ni estas sendependaj. Vjetnamoj ne povas enmiksiĝi en niajn aferojn escepte, se ni mem decidis, ke ili faru tion.

D.—Tamen Kampučio estas alpremita inter Vjetnamio, subtenata de Sovet-Unio, kaj Tajlando, iamaniere helpata de Ĉinio. Ĉu estas risko pri pereado de via krucumita popolo?

R.—Ni rekonstruas nian landon pli rapide ol Polpot aŭ lia antaŭreginto Lon Nol. Se nia lando estus invadita, tiu antaŭenmarŝo ne estus plenumita. Tuj kiam ĉiu parto de nia registaro konsolidiĝos, tiam vjetnamoj sin retiros. Ili jam retiris la konsilantojn el la Nacia Muzeo, kinostudio kaj biblioteko. Vjetnamoj sentas nostalgion pri hejmo kaj familio, deziras reiri al la patrolando.

D.—Ĉu la kampuĉaj rifuĝintoj povas hejmen reiri?

R.—Ĉiuj kampuĉoj devas vivi en sia patrolando. Tiuj, kiuj vivis eksterlande povas reveni krom tiuj, kiuj ne rekonas nian registaron aŭ tiuj, kiuj murdis nian popolon. Ni ja scias, ke en aliaj landoj ili havas pli bonan vivon, sed ni klopodas, ke ili vivu ĉi tie pli facile ol ni. Ili ne vivos kiel ni. Ni nin nutras per fiŝaĵoj kaj salo. Ni oferos al ili bovaĵon, porkaĵon kaj aliajn nutraĵojn pli bongustajn al ili.

D.—Tiu reĝimo anoncas pri preparoj al balotado venontjare. Ĉu ĉiuj partioj povos partopreni voĉdonadon?

R.—La balota partopreno ne estos limigita. La diferencaj politikaj vidpunktoj neniam embarasos nin.

D.—Ĉu vi rifizas la interkonsiliĝon kun la antaŭaj gvidantoj de Kampučio kiel princo Sihanuk kaj Knieu Samphon?

R.—Ni ne starigos iun ajn aliancon kun tiuj homoj. Ni ne interkonsiliĝas kun ili.

D.—Ĝis kia grado de kapableco estas organizitaj viaj armitaj fortoj?

R.—Ni renkontas kelke da malfacilaĵoj en la organizado de nia armeo. Nun estas pluraj teoriaj konkurantoj en la armitaj fortoj, sed ĉiuj inklinas al kunlaboro. La multformeco povas esti potenco. La armitaj fortoj pli kaj pli boniĝas.

D.—Ĉu vi esperas esti akceptita ĉi-jare en UNO?

R.—Ni ne aŭguras kiam ni estos rekonitaj, sed ni konvinkiĝas, ke nia registaro estas subtenata de la popoloj en la mondo. Rekoni reĝimon de Polpot signifas subteni la genocidajn politikojn.

D.—Kampuĉio multe suferis pro la bombadoj de Usono en la milito kontraŭ Vjetnamio. Ĉu vi pardonas al usonanoj?

R.—Ni ne parolas pri la usona popolo. Ni ne povas pardoni la agojn de la usona imperiismo. Se la usona registaro ne praktikas imperiisman politikon, la usona kaj nia popoloj interproksimiĝos tre facile.

Trad: Novoko (Hanoi)



Al gravaj forumoj—kuu plenaĵ manoj

Josip Broz Tito. La nealiancitéco —
konscienco de la homaro

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Sarajevo 1979, paĝoj 97, jugoslavaj dinaroj 30.

La disdivido de la mondo en blokoj estas neevitebla, kaj ankaŭ la aŭtomata funkciigo de la tradiciaj blok-reguloj, kiam temas pri internacia politiko.

Jugoslavio pro sia aparta pozicio lime de du grandaj blokoj iĝis jam en la kvindekaj jaroj gvidanto de movado, kiu kolektis eksterblokajn landojn kaj klopodis reprezenti ties interesojn. Josip Broz Tito iĝis tiam persona simbolo de eksterblokeco.

Ĉi tiu libro kolektas liajn paroladojn okaze de konferencoj de eksterblokaj landoj, kiuj kovras periodon ampleksantan la lastajn 20 jarojn. Temas ĉiam pri larĝperspektivaj paroladoj, kiuj prilumas la ĉefajn intereso-kampojn de ĉiuj eksterblokaj landoj en tiu periodo. Neniam oni trovas en liaj paroladoj rektan antaŭenigon de pure jugoslavaj temoj pro pure jugoslavaj celoj.

Relegante nun la paroladojn faritajn antaŭ deko da jaroj, oni povas pli bone taksu la progreseman potencialon de la eksterbloka movado. Tiu potencialo estis ofte misagnoscata de lokaj landoj en tiuj jaroj, sed post kelkaj jaroj iuj devis mem alpreni similan starpunkton. Ĉi tie mi konsideras unuavice la socialismajn landojn, kiuj antaŭenportas se ne precize la samajn, minimume tre similajn konceptojn pri interŝtata egaleco, kontraŭkoloniismo, kontraŭrasismo, paca kunekzistado, ktp. En kapitalismaj landoj (aŭ, se vi preferas, en la usona imperio) la eksterbloka movado rikoltis ĉiam nur suspektojn kaj kontraŭstarojn, ĉar funde ĝi subtenas progresemajn konceptojn malfacile akordigeblajn kun la kerna naturo de imperiismo.

Prave la libro aludas en la titolo al la pure morala, konscienca forto de eksterblokeco. En perforta mondo ĝi prezentigas ofte kiel senarmila profeto, kaj krome ĝiaj anoj estas inter si dividitaj kaj ofte interdisputantaj. Indikoj pri tiuj limoj parte troviĝas en la paroladoj de Tito, sed kompreneble forestas konkretaj diroj pri liaj „malvenkoj“ de la eksterbloka movado dum la menciita periodo.

Ĉu temas pri aktuala libro? Nepre! La unuaj paroladoj, kun kelkaj esceptoj, tute bone kongruas kun la nuna situacio, en kiu militminacoj ne nur ne malpliigis, sed eĉ fariĝis pli konkretaj, en tiuj, kiuj plej laŭte parolas pri homaj rajtoj, akcelas produktadon de la plej potencaj hommortigiloj.

El lingva vidpunkto la traduko estas relative bona, kvankam jen kaj jen oni trovas kelkajn strangaĵojn. La vorto mem „nealiancitéco“ estas dubinde taŭga. Ĉu „nealianco“ ne esprimus pli simple la saman koncepton? Kaj eventuale „eksterbloko“ estus pli preciza. Krome „rezoluta“, en la sencu de

re
cen
zoj

„decida“, „forta“, kaj similaj, ŝajnas al mi nenecesa latinismo.

Io, pri kio certe ne kulpas la tradukinto, estas la ĥaoso, kiu regas en la nomoj de triamondaj landoj. Tion konfirmas ankaŭ broŝuro pri UNESKO ĵus eldonita de UNESKO mem kunlabore kun UEA. La obstina rifuzo sekvi ankaŭ ĉe triamondaj landnomoj la simplan zamenhofan ujo-regulon, kondukas al plej strangaj strangaĵoj. Mi citas nur kelkajn parojn el la recenzita verko kaj la menciita UNESKO-broŝuro: Afganistano-Afgano, Bahreno-Barejno, Kamboĝo-Kampuĉio, Kongo-Kongolando, Laoso-Laŭa Respubliko, Srilanko-Srilanko, Voltio-Voltalando.

Renato Corsetti

STUMPIGITA ĈEFVERKO

LA FARAONO, bildrakonto laŭ la romano de B. Prus.

Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, 1980.

Boleslaw PRUS, kiu fakte nomiĝis Alesander GLOWACKI (1847—1912), povas esti enkalkulita inter la ĉefaj polaj verkistoj de la dua duono de la 19a jarcento. „La Faraono“ komencis aperi felietone en 1895 en

la gazeto „Tygodnik iIlustrowany“. Verŝajnas, ke ĝi estas „ŝlosila romano“, en kiu Ramses XIII signifas Nikolaon II. Tiel Prus povis, spite la caran cenzuron, pritrakti la problemojn de la povo kaj ŝtata organizo, kaj de la nepra progreso kontraŭ la sociaj problemoj. Sed historian aŭtentecan oni ne trovos en ĝi: ĉefaj personoj de la romano estas Ramses XII kaj Ramses XIII (strange skribitaj Ramzes), sed la Historio konas ĝuste nur 11 Ramsesojn! La esperanta traduko de KABE (Kazimierz BEIN) en 1907 estis prave konsiderata kiel stilmodelo.

Sed ĉu estis vere neĉese mallongigi tion en nur 32 paĝoj da bildoj? En tiu ĉi romana stumpo, nenio, tute nenio postrestas de tio, kio faras la valoron de la verko de Prus. Bildrakonto ja taŭgas por amuza, bonhumora, aŭ porinfana rakonto, tute ne por serioza ĉefverko. Ramses ĉi tie estas malgrandigita usoneske ĝis la nivelo de Buffalo Bill aŭ de Superman. Kia elreviĝo! Eĉ la bildoj, kvankam profesie desegnitaj, ne entenas plej malgrandan originalecon, sed nur la plej ordinarajn banalaĵojn, jam dek milfoje viditajn. Mi eĉ ne sukcesis legi tion ĝis la fino: mi endormiĝis.

Konklude, unu konsilon: se vi nepre volas pasigi iom da tempo sur bildrakonto, legu prefere „Asteriks la Gaŭlo“. Vi almenaŭ ridos. . .

Andre Cherpillod

VERKO

PRI LA ESPERANTO-MOVADO

Literatura premio de R. Schwartz al E. Tofalvi kaj O. Kniĉal

Antaŭ kvin jaroj UEA proklamis la literaturan premion de Raymond Schwartz por la plej bona fikcia prozverko en la Internacia lingvo. Tiu ĉi premio — unika en la movado kaj aŭspiciata de ĝia supera instanco — estis atribuita al la romano „KIUJ SEMAS PLORANTE. . .“ kies kunaŭtoroj estas geedzoj Eva Tofalvi (Hungario) kaj Oldrich Kniĉal (Ĉeĥoslovakio), ambaŭ ĵurnalistoj, delonge aktivaj en la Esperanto-movado, lastatempe sur la kampo de la originala literaturo.

La romano, pri kiu jam amplekse informis iuj gazetoj en Ĉeĥoslovakio konekse kun la aljuĝo de la Premio Schwartz okaze de la 65a UK en Stokholmo, estas verko pri la abnegaciaj klopodoj de l'adeptoj de la Internacia Lingvo en la tempo ekstreme malamika al la Zamenhofa lingvo, en la jaroj, kiam la bruna pesto inundas Eŭropon kaj defias per milito. La esperantista movado estas persekutata, la esperantistoj fariĝas viktimoj de la sekreta polico. „Kiu semas plorante. . .“ prezentas sur la fono de la antaŭmilita Eŭropo sortojn de la minacata movado kaj apoteozas la noblajn aspirojn de la Esperanto-parolantoj. Ĝi montras per aŭtentikaj rimedoj la rolon de la movado meze de la ŝtormaj eventoj sociaj, esprimante samtempe neestingeblan kredon pri la estonto de l'Internacia lingvo.

LA LIRO DE ASEN GRIGOROV

Nia eminenta poeto Asen Grigorov fosis sulkon en la originala poezio de la internacia lingvo. Post siaj du verskolektoj „Garbo“ (Sofio, 1930) kaj „Ruĝa aŭroro“ (unua eldono Sofio, 1931, dua eld. Leipzig, 1933), li nun donacas al la Esperanto-popolo mirindan kolieron el perloj, publikigante sian trian kolekton de poeziaĵoj titolitan „Gardu la pacon!“*) Tiu ĉi kolekto prezentas la poezian krea aktivecon de la poeto dum lia matura aĝo. Efektive, ĉiu versaĵo en ĝi estas vera perlo!

La verskolekto „Gardu la pacon!“ konsistas el du partoj. Parto unua enhavas originalajn versaĵojn grupitajn, laŭ ilia enhavo, en kvar cikloj: a) El la frutempa verkaro; b) Gardu la pacon!; c) Espero nia; d) Ĉu songo aŭ realo?

Ni povus per du vortoj karakterizi la stilon kaj la etoson de la versaĵoj en tiu parto — klasbatala poezio.

... — *decidas ni morti prefere
ol subiĝi sub lia premanta kaj kruda kalkan'.*
... *nin krucumas, torturas infere sur fajra ŝtipar'...*
(Malgraŭ ĉio, p. 8)

Plue, la poezio de Grigorov kvazaŭ distiliĝas, sublimiĝas. Ĉefa objekto de lia inspiro fariĝas la ideo de mondpaĉo, la Zamenhofaj ideoj pri amikeco inter la popoloj kaj la sankta amo inter la homoj:

*Blovu, vento suda, teron vi ornamu
per tapiŝ' el floroj kaj per kora amo!*
(Suda vento, p. 19)

La kulmino de tiu ĉi evoluo estas la poemo „Gardu la pacon!“

*Ni al nenio plia sopiras —
krom ke nur paco surtere estu.*
(Gardu la pacon!, p. 24)

Kaj en la ciklo „Espero nia“ Grigorov montriĝas kiel pasia Zamenhofano, mondlingvano kaj humanisto. Lia poezia vervo ne malofte ŝprucas el lia esperantista idealo. Lia duonjarcenta laboro kaj nobla batalo por la mondlingva ideo, batalo dum kiu Esperanto fariĝis lia dua naturo, ne povis resti ekster lia poezia kreado.

Versaĵoj kiel „Al Zamenhof“ (p. 39), „Espero nia“ (p. 43), „Odo al ADA“ (p. 66), „Mia patrolando“ (p. 51), „Forpasis Kalocsay“ (p. 45) atestas pri la senĉese brulanta, esperantista, mondlingva, Zamenhofa flamo en la koro de la poeto.

La dua parto de la libro havas subtitolon „Malgranda antologio“ kaj prezentas kolekton da poeziaj verkoj el la bulgara nacilingva literaturo. Tie ĉi ni legas en tre zorga kaj laŭeble fidela Esperanta traduko la ĉefverkojn de la plej elstaraj kaj popularaj bulgaraj naciaj poetoj. La poeziaj tradukoj de Grigorov distingiĝas per sia precizeco kaj fideleco al la originalo kaj per la pureco de la lingvaĵo. La tradukinto tre ekzakte (kvankam ne laŭvorte) esprimas la plej delikatajn pensojn de la nacilingvaj aŭtoroj, evitante tamen la nenecesan uzadon de neologismoj.

Oni klare distingas du partojn en la krea evoluo de la poeto. Liaj verkoj el la unua periodo pentras la suferojn de la martiroj-batalantoj por socialismo kaj la kalvarion de la bulgara popolo konvulsianta sub la boto de la okupanto.

La duan politikan periodon de lia verkado markas la jubilo de la venko. El liaj versoj ŝprucas optimismo kaj espero. Ĉefa temo de lia inspiro estas la problemo de la monda paco. Tiu ĉi temo sonas kiel fundamenta kordo, kiel grundtono de lia liro. Ekzemple, la lirika kanto „Al Zamenhof“ ŝajnas esti komponita en la „tonalo“ de „Ho, mia kor!“.

*Sento mia, ŝprucu el la koro,
eksonoru en ĉi tiu strof'!
Pri la Majstro kara rememoru,
kantu nun pri Zamenhof!
Vi aŭguru pri serena helo,*

* Asen Grigorov. *Gardu la pacon*, Budapeŝt 1980

*pri printempa viviganta blox',
lumu forte per la verda stelo
per la kor' de Zamenhof!*

Grigorov komprenis, ke neniam la problemo pri la paco estis pli aktuala ol hodiaŭ, kiam la progresemaj homoj de nia tuta planedo maltrankviliĝas pri la sorto de la homaro kaj streĉas ĉiujn siajn fortojn por konservi la mondpaĉon. Tion demonstros la titolo mem de lia verskolekto, la enhavo de la poeziaĵo portanta la saman titolon kaj la titolo de la rubriko, en kiu ĝi estas lokita.

La poeto posedas ĝis tre alta grado la teknikon de la versfarado. Li havas akran senton pri muziko de la parolo. La reguleco de la ritmo kaj takto interne de la versoj, la harmonia kombino de la sonoj, la riĉeco kaj originaleco de la rimoj, asonancoj kaj aliteracioj estas karakteraj trajtoj de lia poezio. La buntaj bildoj kaj trafikaj komparoj seninterrompe ŝprucas el liaj versoj. Liaj tekstoj estas facile adapteblaj al muzika traktado. Apatre efektivaj montriĝis liaj kanzonoj — „Mia kolekto“ kaj denove „Gardu la pacon!“, muzike aranĝitaj de Veselin Damjanov kaj plenumitaj kun granda sukceso de la komponisto mem dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto, naciaj kaj internaciaj festoj k. a.

Se ni povus koncize karakterizi la stilon de Asen Grigorov ni devas diri, ke ĝi estas bunta, bildoriĉa kaj senartifika. Regante perfekte la internacian lingvon, li ĉiam klopodas ekstrakti el la fonduso mem de ĝia vortaro, el ĝia profunda rezervo ĉiujn leksikajn trezorojn, sen alkuri al nenecesaj neologismoj, sen paradi aŭ fanfaroni per posedo de fremdaj lingvoj, neniam plendante pro limigita nombro da terminoj en la oficiala vortaro. Kaj tiu ĉi principo tute ne reduktas la elvokan forton de lia riĉa stilo. Male. La serĉado de ĉiam novaj kombinoj stimulas lian krea kapablon kaj havigas flugilojn al lia poezia vervo! Lia Esperanto ne estas ia artifika kaj bastarda karikaturo de iu el la grandaj modernaj naciaj lingvoj pri kiu revas iuj interlingvistoj el la naturalisma skolo, sed vere neŭtrala, vere internacia lingvo, egale komprenebla kaj aprezebla de ĉiuj popoloj en la mondo.

La verskolekto „Gardu la pacon“ estas nova kaj tre valoro kontribuo al la originala kaj traduka poezio en Esperanto — kaj ankoraŭ unu nekontestebla pruvo, ke la internacia planlingvo perfekte fleksiĝas sub la plumo de inspiritaj poetoj, por esprimi la plej tenerajn nuancojn de ilia penso kaj emocio. La mondo de la mondlingvanoj kaj la internacia movado por la mondpaĉo atendas ankoraŭ plurajn verkojn el la liro de nia ŝatata Esperanto-poeto.

Prof. d-ro Stojan Guĝev

Asen Grigorov

ESPERO NIA

Espero nia
kore gardata,
ero de l'fajro
de Zamenhof,
celo radia,
sento gefrata,
vorto kaj faro,
de l'homa pov'!

Cel' malproksima,
vojo senfina,
ĉu ni atingus
vin sen esper'?
Ĉu sen fervoro,
sen plena koro
ĝojon ni trinkus
sur nia ter'?

Ne ripetiĝu
plu Hiroŝima,
Lidice nova,
nova Song Mi!

Por la feliĉo
kun kor' sentima,
flam' Zamenhofa
batalu ni!

Vi donas forton
al la spirito,
pacon proponas
al tuta mond',
pelas la morton
de la milito,
vivon vi donas
por la estont'!
Ĉiun inspiru
alta sopiro;
nobla decido,
firma fidel'!

Samideano,
kune ni iru
mano en mano
al nia cel'!

PACBATALANTOJ

Al paco celas ni komunel!
Neniu bar' haltigas nin,
ĉar ni nin tenas firme kune,
ĉar mankas
en la koro
tim'!

Etendas sin la tera spaco.
de paralel'
al paralel'.
Ni luktas por la homa paco!
Benita estas nia cel'!

Ni iras laŭ savanta spuro
al feliĉo de l'estont'.
Pli klara iĝas
la lazuro,
pli vasta —
nia horizont'.

Aŭskultu:

sonas la fanfaro!

Rigardu:

lumas glora stel'!

Antaŭen iras la homaro

al la benita hela cel'!

El la ĵusaperinta verskolekto

„Gardu la pacon“ (vidu la recenzon)

DISKRIMINACIA VARBADO DE OFICISTOJ

Por iĝi oficisto de Universala Esperanto-Asocio la sola lingva kondiĉo estas, ke li/ŝi bone konas la solan oficialan lingvon Esperanto. Ne estas kondiĉoj por tiu aŭ alia eŭropa nacia lingvo.

La statuto de Unuiĝinta Naciaro en sia paragrafo 101—3 diras: „La decida konsidero en la dungo de oficistoj kaj en la difino de iliaj laborkondiĉoj devas esti la neceso akiri la plej altajn gradojn de kapableco, kompetenteco kaj honesteco. La graveco de enoficigado sur laŭeble plej vasta geografia bazo ankaŭ devas esti atentata.“

Do, la supra paragrafo kondiĉigas nur la laborkapablon kun sincereco ĉe la dungotoj kaj la geografian konsideron ĉe la dungontoj.

En la realo, kio okazas? Ĉar la oficialaj lingvoj estas nur 6 (angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa), estas evidente, ke ĉiu oficisto parolu unu aŭ du el la 6. Tamen la varbado de oficistoj ofte okazas kun la jena kondiĉo: „oni devas koni anglan aŭ francan lingvon bonege kaj paroli ĝin normale flue“.

Kiam ne troviĝas kompetentaj homoj, kiuj povas flue paroli la anglan aŭ francan, la oficistojn serĉantaj instancoj de UN (fakaj institucioj) dungas tamen homojn, kiuj flue parolas la anglan aŭ la francan kaj kiuj ne tre kompetentas por sia laborfako. Tio kontraŭas la paragrafon 101—3 de la UN-statuto kaj diskriminacias profesiajn kompetentulojn sen lingva kono.

(El „UN kaj Ni“)



Hungario

F-ino Maria Fonad, H-3300 EGER, str. Bercsényi 17—26-jara organizistino, ĉt.

F-ino Erika ÖSZI, H-3300 EGER str. Cifrakapu 37—23-jara komp. programfaristino, ĉt.

F-ulo Miklós FEJÉR, H-3300 EGER, str. Golya P/b. fsz. 3 — 36 jara maŝinteknikisto, pri turismo, foto, ĉ. t.

S-ino d-rino Maria FALUDI, H-3300, str. / rany János 20 — 41-jara vidvino, juristino — artoj, vojaĝoj

S-ro István Habobás, H-3304 EGER str. 1. lt. /4/B. fsz. 26 jara oficisto pĉt.

S-ino Mihályne ENGEDI H-3304 EGER, str. 1. lt. 8/G 48-jara oficistino — popolarto, pĉt.

S-ino Jözsefné KOVACS, H-3304, EGER, str. 1. lt. 5-B/II. 1. — 50 jara laboristino — ĉt.

Bulgario

S-ino Blagovesta Rajkova, 5300 Gabrovo, „Peter Mihov“ 31 ap. 3 — pri popolaj metioj, naztukoj, vojaĝoj, reciprokaj vizitoj

S-ino Jordanka Stoeva, 5300 Gabrovo, Kiril i Metodi 26, vh. 2 — pri arto, lignoĉizado, vojaĝoj, reciprokaj vizitoj.

Vjetnamio

Ni kolektadas esperantaĵojn por ekspozicio: E-gazetojn, revuojn, prospektojn, PK tutmonde. Respondo rekompencata per BK kaj vjetnamaj presaĵoj. Sendu helpe al adreso:

Nguyen Do Khanh 173 A

Vo Van Tan Q. 3 Tp Hochiminh Vjetnam

ALVOKO EL VJETNAMIO

En Infana Kulturdomo en Hanojo okazas E-kurso el 25 gelernantoj 10—14 jaraĝaj. Pro terura ĉiomanko post 3 jaroj de terura milito la esperantistoj tutmondaj estas petataj helpi al ili per sendado de papero, desegno-albumoj, akvofarboj, feltskribiloj, lerniloj, pm., pk. Volonte ili interŝanĝe sendos infandeseĝnaĵojn. Ilia adreso estas: Esperanto-Kurso Nha van-lea thieu nhi (Kulturdomo de Infanoj) Phô Ngô Guyen Hanôï — Vietnam

Por eviti 5—6 monatan prokraston oni estas petata sendi laŭ eble aerpoŝte, sed kompreneble ankaŭ marpoŝtaĵoj estas ege bonvenaj!

USSR

Vydas Stradomskis — USSR, LITOVIO, 232038 VILNIUS, a/d 718

En For-Orienta havenurbo de Sovetunio Vladivostok antaŭ relative nelonga tempo ekĝermis Esperanto-klubo. Nun la klubo ricevis ejon ĉe la novkonstruita Regiona Domo de Junularo. Por la ekspozicio, dediĉita al solena malfermo de la Domo, la juna klubo bezonas helpon ankaŭ de la tutmonda esperantistaro. Vi povos kontribui diversmaniere, tio dependos de viaj bontrovo kaj eblo. Ankaŭ nuraj gratulkartoj bonvenus!

Nia adreso: USSR, 690039, Vladivostok-39, pro:p.100 let Vladivostoku 103, Regiona Domo de Junularo, Esperanto-klubo.

Anticipe korajn dankojn!

Jaro XXVIII, № 2
 marto—aprilo, 1981

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
 Nikola Aleksiev (Bulgario)
 D-ro Detlev Blanke (GDR)
 Andre Cherpillod (Francio)
 William Gilbert (Francio)
 Oldrich Knichal (ĈSSR)
 Kimiaki Kurita (Japanio)
 Nguen Hai Trung (Vjetnamio)
 Boleslaw Staszczak (Pollando)
 Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)
 Arta aranĝo: Kiril Draĵev (Bulgario)
 Korektis: Rajna Konstantinova

LA REDAKCIO atendas kontribuadojn el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj marĝeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne resendadas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI

HONORA PREZIDANTO: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1 vĥod 2, 1113 SOFIA, Bulgario

PREZIDANTO: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI, Népköztársaság utja 73, Hungario.

VICPREZIDANTOJ: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 USSR.

Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio

GENERALA SEKRETARIO: William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio

SEKRETARIOJ: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyo-to-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, blok 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario

ĈEFREDAKTORO: Violin Oljanov, kv. Emil Markov PK 66, 1404, SOFIA, Bulgario.

CENTRA ADMINISTRANTINO: Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

CENTRA KASISTO (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen 102-45 P.).

RESPONDECULO PRI LANDAJ NUMEROJ DE „PACO“ Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.

KIE ABONI?

AŬSTRALIO: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDE-RIM Qld, 4556.

AŬSTRIO: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN AŬS, 100

BELGIO: Glady Claude, 36 Marne Str, 1030 BRUSSEL.

BRITIO: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN11 OPF 4

BULGARIO: Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj

ĈEĤOSLOVAKIO: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 11 000 PRAHA I 30 kronoj

DANLANDO: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRH. 35 d. kr.

F. R. GERMANIO: Roland H. Hegen, Igelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM

FINNLANDO: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68 01610 VANTAA 61 30 fin. m

FRANCIO: Roger Degrelle, B. P, 23, F-54510 TOMB-LAINE 40 fr. fr.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr, 60, 108 BERLIN 10 DM

HISPANIO: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona). 750 pesetoj

HUNGARIO: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj

ITALIO: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

JAPANIO: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakura-gaoka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

KUBO: Rufino Lopez, Havana Esp.-Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA 1

NORVEGIO: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3155 TOROD

POLLANDO: RUCH — WARSZAWA.

PORTUGALIO: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6 R/C A-LISBOA 350 eskudoj

RUMANIO: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11, R-1900 TIMISOARA.

SOCIALISMA RESPUBLIKO VJETNAMIO: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

SOVETUNIO: Unuiĝo de sovetaĵoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj

USONO: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50

ALIAJ LANDOJ: Bv. turni vin al unu el al ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd, maldekstre).

GRAVE:

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Ĥristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.